

prelego por forumo dum la 93a UK en Roterdamo

Terminologia laboro pri konstruado kaj arĥitekturo

Fabien van Mook (NL)

enhavo


- rondoj por konstruista terminologio
- okazintaĵoj
 - Konstru-Forumo
 - Jarkolekto de TAKE
 - «Koteado en konstrudesegnoj»
 - terminaro pri betono ekster esperantujo
 - kontakto kun vortaristo
- problemoj
- sugestoj

rondoj por konstruista terminologio

- Terminologia Komisiono de TAKE
fondiĝis en 1993. ĉirkaŭ 7 membroj. cirkuleroj ne plu dissendiĝis ekde 12-2004. novaĵoj pri terminologio en la retpaĝaro.
www.purl.org/net/take-tk/
- Konstru-Forumo
en 01-2005 lanĉis Jan Werner (CZ). sendependa kolektivo de ĉirkaŭ 8 fakuloj. 11a cirkulero en 06-2008.
www.purl.org/net/kofo/

Konstru-Forumo

- celo: solvado de terminaj vakaĵoj en la konstruista faklingvo
- sendependeco
- ĉirkaŭ 8 fakuloj: CZ, 2 FR, HR, HU, NL, SI, RU
- Jan Werner redaktas kaj dissendas cirkulerojn
www.purl.org/net/kofo/



Konstru-Forumo

10

Marto – 2008

Jan Werner: redadreso: <...>

Enkonduke al la 10-a numero

La ĉefa celo de miaj diskut-leteroj *Konstru-Forumo* estas solvi terminajn problemojn de nia fako – konstrua fako – inkluzive de ĉiuj parencaj fakoj, subfakoj, mettoj. La interkonsiligo estas grava por efektiva interkomprenigo ne nur en nia kelnembra grupo, sed pere de nia aktiva penetrado en fakajn aranĝojn kaj periodaĵojn ni plu portu la rezultojn de nia traktado, ankaŭ al vortaristoj, kiuj povas helpi en la vastigo de la rezultoj al la esperantista publiko. Komparante niafakan terminaron kun fakoj natursciencaj kaj humanismaj, mi konstatas, ke teknikaj fakoj entute estas terminologie malzorgataj.


Mi esprimas dankon al Prof. Dr. Erich-Dieter Krause, ke li komprenas nian situacion kaj en siaj ampleksaj vortaroj li publikas miajn interkonsentitajn terminojn. En la 9-a *Ko-Fo* mi menciis kelkajn terminojn, kiuj aperis en la nova Granda Vortaro Germana-Esperanta. Nun mi trovis tie ankaŭ la novan fomon *buldozro*, *buldozri* (la ĝis nun aplikata fomo *buldozo* estas plene nesistema, laika). En tiu ĉi letero aperas teksto pri nova traktado inter Prof. Krause kaj mi, esprimebla utila por nia fako. Plurajn novajn formojn de konstrufakaj terminoj mi sukcesis enigi en la ĉefa-esperantan vortaron kompilitan de mia amiko Karel Kraft, ĝian suplementon nun pretigas Miroslav Malovec, mi estas konvinkita, ke ankaŭ li bonvolos ion el miaj atingajoj enmeti, ion ne tro altfakan. Ĉu ankaŭ vi povas en tiu direkto agi?

En la tagoj 7-a ĝis 9-a de novembro 2008 okazos en Dobřichovice apud Prago KAEST (Konferenco Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko). Mi planas tie prezenti prelegon „Konstru-Forumo sin prezentas“, en kiu mi parolos pri interkonsentitaj konstrufakaj terminoj kadre de nia forumo. La informojn vi trovos ĉe: <http://www.kava.spech.cz/kaest>.

En la nuna jaro mi provos esti pli akurata koncerne la aperigadon de la diskut-letero *Konstru-Forumo*. Mi petas ankaŭ vin reagi laŭble rapide kaj konkrete. Post aperigo de la 9-a letero en januaro 2008 mi ricevis tri viajn respondojn. Ĉar temis precipe pri statikaj problemoj, mi atendis voĉon ankaŭ de la kolegoj Obradoví kaj Halász, eble ankaŭ de la masinĝenero Flvóuth. Mi petas ilin reagi al la 9-a n-ro ankorau nun, marte-aprile 2008. Kaj nun ni tujn nian atenton al la traktataj temoj.

Ni solvas termin-vakaĵojn

La temo 6 – kelkaj nocioj el statiko. Fabien van Mook skribis (2008-02-20): Verŝajne vi kaj mi ne tute konsentas pri la pridiskutitaj statikaj nocioj kaj terminoj (ŝarĝo, streĉo, forto kaj tensio). Mi ne plu volas reteni la forumon pri la temo 6; se la aliaj forumanoj ne plu komentas, ni fermu tiun temon kaj akceptu la



- pridiskuto de (ĝis nun) 19 nocioj/malgrandaj nociaroj:
 - (1) kompozito
 - (2) ŝpalo,
 - (3) trabfaka sistemo,
 - (4) urbanismo kaj urboplanismo,
 - (5) secesio,
 - (6) ŝarĝoj, streĉoj, deformoj ktp,
 - (8) tretejo,
 - (11) kvoto/koteo,
 - (12) edificio,
 - (13) kipado kaj loka knikado,
 - (14) asfalto kaj bitumo,
 - (15) trafluo/debito/spezo,
 - (16) titolkampo kaj legendo,
 - (17) spano/spanejo,
 - (18) «Umgebende(haus)»,
 - (19) furniro/forniro
- labormetodo laŭ minimuma laborpovo: spontaneo & malgrandegaj nocikampoj, sed internacieco

Jarkolekto de TAKE

- ekde 2005 anstataŭas la organon de TAKE («La Domo»)
- 2005, redaktanto Jan Werner, 9 artikoloj, 68 paĝoj
- 2006, Fabien van Mook, 7 artikoloj, 101 paĝoj
- 2007, Bronislav Ĉupin (RU), 5 artikoloj, 45 paĝoj
- 2008, Đorđe Obradović (SI)

«Koteado en konstrudesegnoj», Jan Werner, 2008

(1)	<p>Koteo – cifera nombrovaloru aŭ simbolo (litera aŭ grafika), event. ilia kombino, kiu sur desegnaĵo pere de determinitaj mezurunitoj indikas postulatan aŭ mezuritan grandecon de koneksa dimensio de bildigita objekto aŭ de ties parto en realo (ekz. longecon, angulon, alto-pozicion), nome sendepende de skalo, laŭ kiu estas la bildo desegnita. Grafikaj kaj literaj simboloj alskribataj al la nombrovaloru (ekz. Ø, □, R, H8), event. grafikaj simboloj, en kiuj aŭ al kiuj koteoj alskribatas (ekz. ĉe alto-koteoj, ĉe preskribado de forma kaj precizeca toleranco). RIM.: la nocio <i>koteo</i> en praktiko ofte ampleksas ankaŭ kote-liniojn, helpajn (kote)liniojn, limigajn signojn k.a.</p>
(2)	<p>Kotelinio – streko aŭ segmento de cirklo, sur kiu estas unusignife determinita (ekz. per limigaj signoj) (4) la koncerna dimensio de</p>

Koteaj sistemoj

34 Ĉe koteado de du aŭ kelkaj long-dimensioj en la sama direkto kaj ĉe koteado de anguloj havantaj komunan verticon, oni uzas:

- ĉenan koteadon (art. 35 ĝis 38);
- koteadon ekde unu bazo (art. 39 ĝis 42);
- miksitan koteadon (art. 43).

Speciala kazo de koteado ekde unu bazo estas la koteado de altoj (art. 44 ĝis 46).

Ĉena koteado

35 Ĉenoj de apud si vico sekvantaj koteoj estas uzebblaj, se la sumo de limaj devioj de unuopaj dimensioj ne povas influi la funkcion aŭ amastaltigeblon de objekto (komponento) – fig. 39.

36 Sumaj ĉenaj koteoj (fig. 40) estas uzebblaj, se la supra (infra) limaj dimensio de suma koteo povas egali al la sumo de supraj (infraj) limaj dimensioj de partaj koteoj.

Se en la fermita ĉeno de koteoj aperas konflikto en limaj devioj de dimensioj (ekz. laŭ koneksa normo por limaj valoroj de netolerataj valoroj), estas necese, ke tiu koteo en la ĉeno estu enskribita kiel informo (ne strikte deviga) en rondaj krampoj (vidu fig. 40 A).




Fig. 40

Sur konstru-fakaj desegnaĵoj (fig. 40B), ĉe suma koteado, estas uzebblaj koteoj en krampoj nur tiam, se estas por la koncerna komisiito de unuopaj elementoj fiksita limaj devioj.

37 Multenombraj vicoj de samaj dimensioj (ekz. paŝojn de samaj elementoj disigitaj egalpade sur rekto aŭ arko) estas eble kotei per produkto anstataŭ per ĉena koteado. En tiu kazo oni koteas per memmitara koteo nur la unuan paŝon en la vico kaj sur la plua kotelinio, indikanta la distancon de aksoj de la eksteraj elementoj, oni citas produkton, en kiu la unua nombro indikas kvanton de paŝoj kaj la dua nombro grandecon de paŝo. Pro kont-

«Terminaro de betono kaj de betonistaj laboroj» (2002)

- Jan Werner (CZ) kaj kolektivo (DE, NL, SI, CZ)
- recenzantoj el FR kaj RU
- 4-lingva: EO, CZ, DE, EN (parte NL)
- en 2007 Jozef Halász (HU) prezentis al inĝenieraj ĉambroj de CZ, HU, PL & SK

A. BETONO KAJ TIES KOMPONENTOJ		
BAZAJ NOCIOJ		
1	betono <i>en</i> concrete <i>de</i> Beton <i>m</i> <i>cs</i> beton <i>m</i>	konstrumaterialo, kiu estiĝas per firmiĝo de ligento en miksajo kun ŝtonaro aŭ alia volumenaĵo kaj kun pluaj komponentoj; kiel ligento plej ofte aperas cemento
2	betonmiksajo <i>en</i> concrete mixture <i>de</i> Betonmischung <i>f</i> <i>cs</i> betonová směs <i>f</i>	meĥanike intermiksataj komponentoj de betono (cemento, ŝtonaro, akvo, ev. ingredientoj) antaŭ enmeto, kompaktiĝo kaj komenco de firmiĝo, ĉe cementbetonoj antaŭ komenco de hardiĝo de cemento en la miksajo
3	ligento <i>en</i> binder, binding agent <i>de</i> Binder <i>m</i> , Bindemittel <i>n</i> <i>cs</i> pojivo <i>n</i>	substanco kapabla ligi grajnoj de inertaj substancoj - volumenaĵoj; laŭ destino de betono oni distingas la ligentojn: morteraĵojn (v. art. 17), mastikojn, gluojn, sintezajn plastojn, ligajn ceramikajn substancojn
4	volumenaĵo <i>en</i> aggregate <i>de</i> Zuschlag <i>m</i> <i>cs</i> plnivo <i>n</i>	solida inerta substanco de konvena grajneco (v. art. 19), kiu el vidpunkto de volumeno estas la baza komponento de betonmiksajo kaj betono
5	ingrediento <i>en</i> ingredient, admixture <i>de</i> Zusatz <i>m</i> <i>cs</i> přísada <i>f</i>	substanco, kiu estas pro modifa celo etkvante aldonata en miksakvon aŭ en miksajon dum ties miksado
6	akvo <i>en</i> water <i>de</i> Wasser <i>n</i> <i>cs</i> voda <i>f</i>	komponento de betonmiksajo, kaze de ligento bazita je morteraĵo, ekzemple cemento

kontakto kun vortaristo

- E.D. Krause, «Großes Wörterbuch Deutsch-Esperanto», 2007
- fakvortoj eniris la vortaron:
balko (Balken), trusa balko (Fachwerk), buldozro, [tegmenta] lukarno (Gaube, Gaupe, Dachgaube), puco (Putz), puci muron (eine Mauer mit Putz bewerfen)
- en februaro 2008 li kontaktis kun Jan Werner, i.a. pri latiso & truso, pri trabfaka domo (Fachwerkhaus) & trabfaka konstrukto (Fachwerk), pri konstrukto & konstrukcio

problemoj

- preskaŭ ĉiu terminologia projekto estas iniciita kaj realigita de unu privata persono; asocio kiel TAKE ne sukcesas liveri rezultojn
- mankas kunlaborantaj fakuloj el diversaj lingvaj aŭ kulturaj komunumoj
- ĉiu entuziasmulo havas planojn, sed mankas tempo kaj mankas samfakaj esperantistoj

sugestoj

- en terminologia laboro gravas
 - apliko de internaciaj normoj (k.s.) pri la fako
 - apliko de internaciaj normoj de ISO pri terminologia laboro
 - kolektiva laboro (izolita fakulo neniam mem lanĉu terminaron)
 - apliko (ekzamenado) de terminoj en fakaj tekstoj
- restarigu TEC-n, nur se kandidatiĝas terminologo
- dum manko de tia funkciulo, UEA povus starigi premion aŭ eluzi fonduson (Wüster) por
 - (re)eldono de terminaroj, kaj mona subteno al terministoj
 - famigo de fakuloj-terministoj

dankon